

Ĉeĥoslovaka kultura idealo

Dr In. Arnošt Bláha.

Kulturo estas certe nur unu. Tamen oni ne devas imagi ĝin kiel simplan tonon, sed pli ĝuste kiel kunmetitan akordon. Ĝian sonecon kaj kolorecon pliriĉigas ĉiu popolo laŭ la personeco de sia karaktero, laŭ la grado de sia evoluo kaj de siaj kreaĵoj. La kulturo ne estas lukso. Ĝi estas la esprimo de homa volo al vivo, memkonservado, ĝi estas la defenda reakcio kontraŭ eksteraj impulsoj, atakoj kaj influegoj. Ĝi estas la protekta volbo al la homa gento, kiun la homo mem kreis super si. Se la naturo estas ĉio, kio ekzistas sen la homa volo kaj kreado kaj sen lia merito, tiam la kulturo estas alkonstruaĵo de l'homo super la verko de l'naturu. Ĝia origino radikas en la batalo kontraŭ la naturo kaj en ĝia iom-post ioma superregado. Estas egale, ĉu temas pri materia kaj organika naturo ĉirkaŭ ni, ĉu temas pri la materia kaj organika naturo en ni, ĉu temas pri naturo sociala, t. e. asociaj kuniĝoj kuntenataj pli per fortoj naturaj, nome instinktoj, ol per fortoj spiritaj. Tiam ni povas paroli pri kulturo teknika, t. e. la submetigo de la naturaj fortoj ekster ni, pri kulturo individua, t. e. la regado al la naturo en ni, kaj pri kulturo sociala, t. e. la regado al la naturaj tendencoj pri la homa kunasociiĝado. El tio sekvas, ke kulturo estas la konstanta liberiĝo de l'homo kaj mondo de la naturo, la konstanta penetrado de l'homeco en la naturon per instrumentoj, de l'homo per vero, belo kaj bono, kaj fine de l'asocio per socialaj aranĝoj. En la plej vasta senco servas do la kulturo al la konstanta proksimiĝo de l'homo al la fina efektivigo de la humana idealo.

Jes, estas vero, ke la diversaj elementoj de l' kulturo ne progresis kaj ne evoluis konforme kaj egale rapide. Precipe la evoluo de la individua kulturo restis post la ceteraj kulturaj elementoj. Tion oni sentis neniam tiel forte kiel nuntempe, kiam oni eksopiras al nova humanismo, apogita per nova scienco pri la homo kaj per nova kulturo de personeco; kaj estas ĝojige, ke tiu ĉi sopiro estas plej forta inter la junularo. Jen la sekvo de ekkono, ke ni submetis al nia regado la mondon eksteran, sed ne la naturon en ni. Tiun ĉi fakton montris al ni en plej akra lumo precipe la mondmilito. Evidentiĝis, ke la homo multe pli progresis en la regado al la materia mondo ol spirita, ke la inventaĵoj faris la vivon tiel komforta kaj ebligis tiom da ĝuoj, ke la homoj ekinklinis al pasiveco kaj degenero. Evidentiĝis, ke la inventaĵoj estis misuzataj al celoj de rabema, homa besteco kaj senbrida pasio. Mallonge dirite, ne estas ekvilibro inter la potenco, kiun donas al ni la teknika kaj sociala kulturo kaj nia morala leviĝo kaj nobliĝo.

Oni ekkonis, ke, pro la ne egale progresinta individua kulturo, la homo ne estas sufiĉe evoluinta en sia pli alta spirita personeco, ke li povu servi la teknikan, ekonomian kaj politikan kulturon en senco de pura homeco al la humana idealo. Tio estas la radikoj de la nova humanismo kaj de la deziro al nova revolucio, revolucio, kies celo estus la kreo de nova homo. Tiun ĉi deziron subtenas la spertoj el la mondmilito, kiu montris, kiel supraĵa estas la vera kulturo en la homa asocio. Kvankam la milito evidentigis la senmezuran evoluon de l'teknika kulturo, kvankam la socialaj institucioj estis submetitaj al gravaj renovigo kaj reformo, tamen aliflanke oni akcentis tiujn ĉi socialajn instituciojn tiel forte, ke la diktatoraj reĝimoj oferis al ili eĉ la homon kune kun liaj pensado kaj konscienco.

Se la homa personeco, degradita dum la milito al senvalora cifero, senigita de ĉia homa indeco, kaj en la postmilita tempo turmentita per miloblaj malagrabraĵoj, se oni tiun ĉi perditan, forgesitan, humiligitan homan personecon denove trovis kaj revalorigis, se tra la mondo iras forta ondo de nova humanismo, do, tio estas ĝuste la kultura idealo, kiun la ĉeĥoslovaka popolo heredis de sia historio, kies plej esenca senco ĝi estas, sed ĝi trovis ankaŭ en ĝia eminenta filozofoprezidanto T. G. Masaryk la plej elokventan heroldon. Ni pensu je la magistro Jan Hus, kiu kiel unua en la tiama Eŭropo starigis la leĝon de l'konscienco super ĉiujn leĝojn de l'mondo, elaçetante ĝian venkon per sia propra morto; ni pensu je la Hus-anoj, kiuj songis pri granda mondregno regata el Bohemio, kies fundamenta leĝo estus la evangelia amo kaj justeco; ni pensu pri la sudbohemia kamparano Petr Chelčický, kies voĉo: "Ĉu Dio nuligis sian ordonon: Ne mortigu!" aŭdiĝis sentime

en la bruanta milito skuenta en la unua duono de la 15-a jarcento la centran Eŭropon; ni pensu je la reĝo Jiří z Poděbrad, la iniciatoro de la Ligo de l'Paco, kiu post jarcentoj reenkorpiĝis en la Ligo de nacioj, kaj lia alta idealo de internacia demokratio; ni pensu je la panzofiaj klopodoj de Jan Amos Komenský, kiu en la sama tempo, en kiu la liĥtenŝtejnaj dragonoj turmentis lian popolon, pensis pri liberigo de sia patrujo kaj mondo per edukado kaj klopodas, ke la ĉeĥa esenco fariĝu principo de progreso, kaj ke lia popolo okupu inter la ceteraj la unuan lokon pro sia matureco, instruiteco kaj nobleco; ni pensu je la viroj de la 19-a jarcento, kiuj vekis la popolon al nova vivo, nome Dobrovský, Kollár, Havlíček, Palacký, por kiuj la humanismo estis celo ne nur de ilia pensado, sed ankaŭ de ilia klopodado. Ili kredis, ke humanismon oni atingos nur per rimedoj humanaj, nome per klera kapo kaj varma koro. Ili forte akcentis la vortojn de Palacký montrante per ili al la popolo ke ĉiam, kiam ni venkis, ni venkis pli per forto spirita ol fizika, kaj ĉiam, kiam ni estis venkitaj, ĝi estis la sekvo de mankanta spirita agemo, morala braveco kaj kuraĝo. Ni pensu finfine je Masaryk mem, kiu la ĉeĥan demandon, kiu volas esti ne nur demando ĉeĥa sed samtempe tutmonda, esprimis per tiuj ĉi malmultaj kiel el ŝtono ĉizitaj vortoj: "Ne perforte, sed pace - ne per glavo, sed per plugilo - ne per sango, sed per laboro - ne per morto, sed per vivo al vivo . . . jen ĉiam la sama respondo de la ĉeĥa genio, jen la senco de nia historio kaj heredaĵo de niaj antaŭuloj. Se ni do pensas je kiu ajn el tiuj ĉi helaj aperaĵoj de la ĉeĥoslovaka historio, ĉie ni trovas egalan sincerecon en la klopodo: starigi kontraŭ la forto de l'materio la forton de l' spirito, ĉie ni trovas sinceran klopodon ŝanĝi sin mem kaj la mondon per kulturo de l'spirito kaj koro. Kaj precipe Masaryk, dissemante laŭ Komenský kiel vera "Viro de amo" per sia instruado kaj post la milito antaŭ ĉio per siaj prezidantaj manifestoj semojn de eternaj veroj, akcentis, ke nenia sociala reformo valoras sen reformo individua, kaj ke materia revolucio, se ĝia fino ne estu nigra reakcio, devas kulmini en revolucio de l'kapoj kaj koroj. Tiu ĉi konvinko estas la fonto de lia instruo, ke la politikon devas fari homoj prudentaj kaj honestaj kaj ke la homo devas esti ĝia celo, sed ne ĝia rimedo. Ĝi estas la fonto de lia instruo, ke la ekonomia ordo devas esti tia aranĝo de la asocio, kia ebligas al ĉiu ano partopreni ĝian utilon kaj vivi sian ĉeĥecon vere inde kaj home. Ĝi estas la fonto de lia instruo, ke la sociala demando estas en sia kerno demando morala. Ĝi estas la fonto de lia instruo, ke la teknika kaj sociala kulturo devas bazi sur kulturo individua kaj ke harmonie organizita asocio povas esti fondita nur sur plene kaj harmonie evoluinta individuo. Vivi nur per tekniko, tio estas malmulte vivi; vivi nur per politiko, tio estas malmulte vivi; vivi nur per profesio, tio estas malmulte vivi; vivi nur per ekonomia agado, tio estas malmulte vivi. Tiomfoje ni multobligas nian vivon, kiom ni sukcesos evolui ĉiujn spiritajn kaj moralajn elementojn de nia individueco, por ke ni povu servi per ili spirite kaj vere al la idealo de l' homaro. Tio estas la heredaĵo de la ĉeĥa historio, kiu kulminas en la instruo kaj personeco de Masaryk. Ĝi estas esprimita mallonge per la vortoj: "Ni volis kaj volas esti veraj homoj." Tio estas la ĉeĥoslovaka kulturidealo, per kiu la misio de la ĉeĥa historio fariĝas samtempe tutmonda. Ĉar la popoloj finfine diferenciĝas reciproke nur per la sincereco en sia klopodo atingi puran homarecon.

Tradukis
Th. K i l i a n

Československý kulturní ideál

Ing. Arnošt Bláha

(Předneseno do radia, esperantská relace)

3.X.1934

Kultura jest jistě jen jedna, ale ovšem nesmíme si ji představovati jako jednoduchý tón, nýbrž spíše jako složitý akord. A každý národ přispívá ke zvučnosti a barvitosti tohoto akordu podle osobitosti své povahy, svého vývojového stupně a svých tvůrčích schopností. Kultura není luxusem, kultura je výrazem lidské sebezáchovnosti, je obrannou reakcí proti podnětům, útokům a nátlakům vnějšího prostředí. Je ochrannou klenbou lidského rodu. Jen člověk si ji nad sebou vytvořil. Rozumíme-li přírodou to vše, co je tu bez lidského chtění, přičinění a tvoření, tedy kultura je lidská nadstavba nad dílem přírody. A vznikla zápasem s přírodou, zvládnutím přírody, ať už tou přírodou rozumíme hmotnou a organickou přírodu kolem nás, ať hmotnou a organickou přírodu v nás, ať přírodu sociální, t.j. svazky společenské držené pohromadě spíše silami přírodními (instinktivními), než duchovními. Pak můžeme mluvit o kultuře technické, t.j. zvládnutí přírodních sil mimo nás, o kultuře individuální (zvládnutí přírody v nás) a o kultuře sociální (zvládnutí přírodních tendencí o lidském sespolečenštění). Kultura v důsledcích toho znamená stále odpřírodňování člověka a světa, stále zlidšťování přírody (skrže nástroje), člověka (skrže hodnoty, zvláště hodnotu pravdy, krásna a dobra) i společnosti (skrže společenská zřízení). V nejširším slova smyslu slouží tedy všechna kultura stálému přibližování se k uskutečnění humanitního ideálu.

Je ovšem pravda, že rozvoj všech těchto složek kultury nedál se souměrně a stejně rychlým vývojovým tempem. Že zvláště rozvoj kultury individuální zůstal značně opožděn za rozvojem ostatních složek kulturních. Nikdy se to více necítilo než dnes, kdy se najednou začíná volat - a potěšitelné je, že je to zvláště mezi mládeží - po novém humanismu, opřené o novou vědu o člověku a o novou kulturu osobnosti. Neboť se poznalo - a světová válka dala této skutečnosti vystoupit v pronikavém osvětlení - že jsme se sice zmocnili vlády nad světem vnějším, ale nedostali jsme do moci přírodu v nás. Poznalo se, že lidská vláda nad světem hmotným předhoniла vládu nad světem duchovním, že vynálezy učinily životy tak komfortním a vytvořily takové množství požitků, že lidé byli svedeni k nečinnosti a úpadku; že vynálezů se zneužilo k účelům dravé lidské živočišnosti a svěřepé vášnivosti, že zkrátka není rovnováhy mezi onou mocí, jakou nám dává kultura technická a sociální a naším zušlechtěním a povznesením mravním.

Poznalo se, že v důsledku opožděnosti kultury individuální není člověk po stránkách své vyšší duševní osobnosti dost vyvinut, aby se jimi mohl zmocňovat té vnější technické, hospodářské a politické kultury ve smyslu čistého lidství, ve službách humanitního ideálu. Odtud ten nový humanismus, volání po nové revoluci, revoluci, která by směřovala k vytvoření nového člověka. A to tím spíše, že světová válka ukázala, jak je skutečná kultura ve společnosti lidské přece jen ještě velmi zánovní a jak přes to, že byla prokázána nesmírná vyspělost kultury technické a že se přispělo vydatně k obnově a reformě zřízení sociálních, na druhé straně byl položen na tato sociální zřízení tak krajní důraz, že jim - v diktaturách - byl obětován člověk se svým myšlením a svědomím.

A jestli lidská osobnost, za války snížena na bezcennou číslici, i zbavená vši lidské důstojnosti, v dobách poválečných rvaná tisícerými nesnáze, ztracená, zapomenutá, pokořená, nyní je znovu nalezena a znovu zhodnocena, jestli světem jde mocná vlna nového humanismu, tedy to právě je kulturní ideál, který v českém národě nejen našel v jeho vynikajícím filosofovi-presidentovi T. G. Masarykovi výmluvného a oddaného hlasatele, ale který jest zároveň odkazem českých dějin a tvoří nejpodstatnější jejich smysl. Neboť ať už myslíme na Mistra Jana Husa, který zákon svědomí dovedl první v tehdejší Evropě postavit nad všechny řády světa a obhájit jej vítězně svou smrtí, ať na Husity, kteří snili o velké světové říši, která by z Čech byla řízena a založena na zákonu evangelické lásky a spravedlnosti, ať na jihočeského sedláka a myslitele Petra Chelického, jehož hlas: "Zdaliž odvolal Bůh přikázání své: Nezapíšeš!" ozval se neohroženě do tehdejších bouří válečných zmítajících v první polovici s jeho vznešeným ideálem mezinárodní demokracie 15. stol. střední Evropou, ať na krále Jiřího z Poděbrad, osnovatele Ligy Míru, předchůdce to Společnosti národů, ať na pansofické snahy Jana Amosa Komenského, který v době, kdy lichtenštejnští

dragouni mučí jeho národ, pomýšlí na osvobození vlasti a světa vychováním a usiluje, aby češství bylo principem pokroku, a aby jeho národ zaujal mezi ostatními prvenství co do vyspělosti, vzdělanosti, ušlechtilosti, ať na národní buditele v 19. stol. jako byl Dobrovský, Kollár, Havlíček, Palacký, pro něž humanita byla cílem nejen všeho myšlení, ale i všeho snažení a kteří věřili, že humanita jen humánními prostředky se dobude - osvícenou hlavou a teplým srdcem a kteří důrazně zvláště slovy Palackého svému národu do očí stavěli, že kdykoliv jsme vítězili, dalo se to pokaždé více převahou ducha než mocí fysickou a kdykoliv jsme podléhali, že tím byl vinen vždy nedostatek duchovní činnosti, mravní statečnosti a odvahy, - ať konec konců na Masaryka samotného, jenž českou otázku, která chce být otázkou nejen českou, ale zároveň světovou, zhustil v těchto několika jako z kamene vytesaných slov: Ne násilím, ale smírně, ne mečem, ale pluhem, ne krví ale prací, ne smrtí ale životem k životu - toť odpovědi českého genia, toť smysl našich dějin a odkaz velkých předků, - ať už tedy myslíme na kterýkoliv z těchto světlých zjevů českých dějin, všude je tu opravdovost úsilí: proti řádu hmoty postavit řád ducha, opravdovost úsilí proměnit sebe i svět kulturou ducha a srdce. A zvláště Masaryk, rozsévaje jako pravý Komenského "muž lásky" svým učením a po válce především svými presidentskými poselstvími věcnou setbu svých pravd, zdůrazňoval že žádná reforma sociální neobstojí bez reformy individuální a že revoluce hmotná, nemá-li se zvrhnout v nejčernější reakci, musí být podepřena i dovršena revolucí hlav a srdcí. Odtud jeho učení, že politika musí být obsluhována lidmi rozumnými a poctivými a že člověk jí musí být vždy cílem, nikdy prostředkem, odtud jeho učení, že hospodářský řád musí znamenat takovou úpravu společenského prostředí, aby všichni se mohli těšit z jeho výhod a vyžít své češství opravdu důstojně a po lidsku; odtud jeho učení, že otázka sociální jest ve svém jádru otázkou mravní; odtud jeho učení, že kultura technická a sociální musí být podložena kulturou individuální a že harmonická a uspořádaná společnost může být založena jen na harmonickém a plně rozvitém individuu. Žít jenom technikou, to je málo žít; žít jen politikou, to je málo žít; žít jen povoláním, to je málo žít; žít jenom hospodářskými činnostmi, to je málo žít. Tolikrát svůj život znásobíme, na kolik dovedeme rozvíjet všechny duchovní a mravní složky své osobnosti, aby jimi mohlo být slouženo v duchu a pravdě ideálu lidství. To je odkaz českých dějin, završený v učení a osobnosti Masarykově. Vyjádřen je stručně slovy: Chtěli jsme a chceme být lidmi doopravdy. To je kulturní Československý ideál, jímž poslání českých dějin stává se zároveň posláním světovým. Neboť národové se konec konců liší od sebe jen opravdovostí svého úsilí o plné lidství. -